
*neĝa koro*

# espéranto Provence

**kvaronjara gazeto de la Provenca Esperanto-Federacio n° 107 - vintro 2016 / 2017**

## Vorto de la Prezidanto

La jaro 2016 finiĝis per bonega informo : nia federacio ricevis subvencion de la urbo Marsejlo por la kongreso de *Espéranto-France*.

Pro tio, mi volas dankegi tre forte la diversajn samideanojn, ĉefe *Thierry Spanjaard*, kiuj laboris por la sukceso de tiu evento sen ŝpari sian tempon...

Gratulon ankaŭ al ĉiuj, kiuj laboregis dum la jaro por la viglo de nia federacio. Okaze de tiu-ĉi gazeto, mi profitas por sendi al vi, karaj membroj, **miajn bondezirojn por la nova jaro 2017.**

*Pierre Oliva*

## La 14-a de aprilo 2017
## markos la centan datrevenon de la morto de Ludoviko Zamenhof.

Unesko akceptis proponon de Pollando listigi tion inter mondskale notindaj datrevenoj de la venonta jaro. Tiu jaro estos do okazo ne nur rememori kaj festi la vivon de tiu granda homo, sed ankaŭ proklami kaj esplori la aktualecon de lia vivoverko por la nuntempa mondo.

Vi estos informitaj pri la ĉi-rilataj eventoj, kiuj okazos en nia regiono aŭ proksime en Francio.

**Ne forgesu pagi la aliĝkotizon - 6 € - al Espéranto-Provence**
por la jaro 2017, ĉu pere de via loka asocio, ĉu rekte al nia kasistino,
*Nicole Lafitte*. (aliĝilo aldonita al tiu ĉi gazeto)
**Dankon !**
***N'oubliez pas de payer la cotisation de 6 € à Espéranto-Provence***
*pour l'année 2017, soit par l'intermédiaire de votre groupe local, soit directement à notre trésorière, Nicole Lafitte*.
*(bulletin d'adhésion joint à ce journal)*
***Merci !***

**Federacia membro-kunveno** / ***Assemblée générale de la fédération***
**dimanĉon 5-an de marto - je la 14-a 30 -** ***Les Issambres (Var),***
***Résidence Vacanciel du Val d'Esquière***
kadre de la Mediteranea Esperanto-Semajno

En la sekvaj paĝoj, bonvolu legi la moralan, agadan kaj financan raportojn por la jaro 2016. Estas aldonitaj sur apartaj folioj la kunvokilo kaj voĉdona rajtigilo (en okazo de via neĉeesto).

**federacia retejo**
www.esperanto-provence.org
**nia federacio sur Facebook**
www.facebook.com/
esperantoprovence

**prezidanto**
Pierre Oliva
Eden Park n° 99
2772 Montée du Vieux Camp
83330 Le Castellet
06 76 55 57 23
nlpolecamp@gmail.com

**baza kotizo por aliĝo**
**(kun la gazeto) : 6€**
ĉeko al :
"Espéranto-Provence"
pere de via loka asocio
aŭ sendota al la **kasisto**
Nicole Lafitte
Eden Park n° 99
2772 Montée du Vieux Camp
83330 Le Castellet
nlpolecamp@gmail.com

**sekretario**
**redaktoro kaj enpaĝiganto**
Pascal Vilain
61 Montée du Castelar
83460 Taradeau
06 42 19 68 51
p.vilain83@orange.fr

**limdato por sendo de publikotaĵoj por la venonta n°**
**31-a de marto 2017**
bonvolu sendi al la supra retadreso
><><
antaŭdankojn pro viaj kontribuaĵoj

## Federaciaj raportoj - 2016

### 1 - Morala raporto (*Pierre Oliva*)

Por federacia prezidanto, estas ĉiam agrable doni informojn pri la finiĝinta jaro.
Des pli ĉijare ĉar ĵus alvenis informo sciigante, ke ni ekhavis subvencion de la urbo Marsejlo por la organizado de la kongreso de *Espéranto-France*, kiu okazis en majo (1700 €, kiujn ni dividos kun *Espéranto-France*).
Prie, mi povis konstati, ke pluraj membroj de nia federacio cerbumis kaj multe laboris, por ke tiu evento estu sukceso. Kaj tio ĝi ja estis.

Estas agrable ankaŭ konstati, ke la membraro de nia federacio ne tro ŝanĝiĝas. Kompreneble, ĉiam eblas esperi pli da membroj, sed la nuna cirkonstancaro estas sufiĉe malfavora por la asocia movado en nia lando.
Agrablas ankaŭ, ke la staĝoj kaj kursoj funkciis normale, kaj ke amikeco regis dum niaj renkontiĝoj.
Kial ne esperi, ke la ĵus komenciĝanta jaro estu ankoraŭ pli bona, kun multe da sukcesoj ?

### 2 - Agada raporto (*Pascal Vilain*)

**1 - Membraro :**
*Espéranto-Provence* havis 94 membrojn je la 31a de decembro 2016.
41 pagis al UFE
el ili : 16 pagis nur al UFE
12 pagis la grupan kotizon (*Marseille* kaj *Gap*)
4 pagis al UFE kaj la Federacio
9 pagis al UFE kaj sia klubo
20 pagis nur al la Federacio
33 pagis nur al sia klubo

**2 – Asocioj, grupoj kaj individuaj membroj**

**2-1 deklaritaj asocioj**
***04 - Manosque*** - E.K.E.M. (Esperanta Kulturo en Manosque): 10 federaciaj membroj
***05 - Gap - Espéranto-Gap*** : 5 federaciaj membroj
***13 - La Roque-d'Anthéron*** : *Espéranto-La Roque*
***13 - Marseille*** : 8 federaciaj membroj
ttt-ejo : *http://esperanto.marseille.overblog.com*
***13 - Miramas*** : *G.E.M. (Groupe Espéranto Miramas)*
***83 - Fréjus / Saint-Raphaël*** : *Espéranto-Club Saint-Raphaël / Fréjus* : 17 federaciaj membroj
***83 - Le Beausset*** - *Espéranto – Le Beausset* : 11 federaciaj membroj
***84 - Avignon*** - K.E.C.A. (Kultura Esperanto-Centro de Avinjono)

**2-2 antenaj grupoj de *Espéranto-Provence***
13 - *La Ciotat* ; 84 - *Carpentras* ; 84 - *Orange*

**2-3 individuaj membroj**
en urboj de la departementoj 04 - 06 - 13 - 20 - 83

**3 - Administro :**
**estraranoj (4) :**
prezidanto : *Pierre Oliva*
sekretario : *Pascal Vilain*
kasisto : *Nicole Lafitte*
helpkasisto : *Michel Cerisay*
**aliaj komitatanoj (5):**
Monique Arnaud, Franz Mimmersheim, Thierry Spanjaard, Renée Triolle, Gilles Wallez

gazetrespondeculo : *Pascal Vilain*
retejrespondeculo : *Franz Mimmersheim*
reprezentanto de nia federacio ĉe *Espéranto-France* : *Pascal Vilain*

**membrokunveno :**
Ĝi okazis en *Marseille* la 8an de majo, okaze de la Eŭromediteranea kongreso (UFE-kongreso).
22 partoprenintoj + 11 senditaj rajtigiloj

**komitatkunsidoj :**
> januaro 24 : *Marseille* (ĉe *Thierry Spanjaard*)
> majo 8 : *Marseille* (post la membrokunveno)
> oktobro 16 : *La Ciotat* (ĉe *Renée Triolle*)

**4 - Instruado :**
**- kursoj**
en *Fréjus–Saint-Raphaël, Le Beausset, La Ciotat, Marseille, Avignon, Manosque*
**- staĝoj :**
> marto 5/12 - *Les Issambres* (83) : Mediteranea Esperanto-Semajno
> novembro 19/20 - *Le Beausset* (83) :

Kultura Semajnfino (kursoj gviditaj de *Nicole Lafitte, Mari-Roza Vilain, Renée Triolle, Pascal Vilain*)

**- ekzamenoj :**

> majo 5 - *Marseille* : FEI-ekzamenoj – 7 kandidatoj por la 1-a grado (5 el Provenco) ; 1 kandidato por la 2-a grado. Zorgis pri la evento *Monique Arnaud* ; ĵuriis *Renée Triolle* kaj *Patrick Lagrange*.

**5 – Informado – komunikado** :

> januaro 4/9 - *Le Beausset* (83) : ekspozicio « *Art et Espéranto* » en *Pôle Saint-Exupéry*

> E.K.E.M. (*Manosque* - 04) : deĵorado en la Domo de la Asocioj la unuan kaj trian sabatojn, ĉiumonate dum la tuta tago ekde la 9a45.

> aprilo 17 - *Marseille* (13) : radio-elsendo kun *T. Spanjaard* pri la Eŭromediteranea kongreso

> septembro 3 - *Manosque* (04) : «Forumo de la asocioj»

> septembro 4 - *Fréjus* (83) : «Forumo de la asocioj»

> septembro 10 - *Le Beausset* (83) : «Forumo de la asocioj»

> septembro 10 - *La Ciotat* (13) : «Forumo de la asocioj»

> septembro 11 - *Marseille* (13) : «Forumo de la asocioj»

**6 - klubaj eventoj** :

> januaro 9 - *Manosque* (04) : ĝenerala kunsido + reĝkuka festeto

> februaro 7 - *Fréjus/Saint-Raphaël* (83) : reĝkuka festo + membro-kunveno

> majo 5/8 - *Marseille* (13) : Eŭromediteranea kongreso (vidu ankaŭ en «Movadaj eventoj»)

> majo 22 - *Fréjus/Saint-Raphaël* (83) : tradicia printempa pikniko (en *Taradeau*)

> junio - *Saint-Bonnet-en-Champsaur* (05) : interveno de *Abdurharman Junusov* en lernejaj klasoj, okaze de prelegturneo en Francio

> junio 15 - *Marseille* kaj junio 16 - *La Ciotat* : prelegoj de *A. Junusov*

> junio 17 - *Le Beausset* : vizito de la urbo kun *A. Junusov*

> junio 26 - *Avignon* (84) : tradicia pikniko en *Pernes-les-Fontaines*

> junio 26 - *Fréjus/Saint-Raphaël* (83) : komuna manĝado kaj distra posttagmezo en *Les Issambres*

> oktobro 3 - *La Ciotat* kaj oktobro 4 – *Marseille* : prelegoj de *Rainer Kurz* okaze de lia turneo en Francio

> decembro 11 - *Avignon* (84) : Zamenhof-tago kun prelego de *Hannes Larsson* pri « Valsoj », sekvata de teatra spektaklo.

> decembro 12 - *Fréjus/Saint-Raphaël* (83) : Zamenhof-tago

**7 – movadaj eventoj**

> februaro – Rusio : partopreno de *Renée Triolle* en APERO (AntaŭPrintempa Esperanto-Renkontiĝo)

> majo 5/8 - *Marseille* : Kongreso de *Espéranto-France*, "Eŭromediteranea Esperanto-Kongreso", organizita de *Eo-France, Eo-Provence* kaj *Eo-Marseille.*

> julio 23/30 : « 101-a Universala Kongreso de UEA » en *Nitra* (Slovakio). Partoprenis *Alain Rémy*.

**8 – kulturaj eventoj**

> marto 8 – *Manosque* (04) : partopreno de EKEM en la Internacia Virina Tago

> marto 18 – *Puy Sainte-Réparade* (13) : ekpozicio kaj prelego pri *Victor Lebrun*. Partoprenis federacianoj

> junio 25 - festo en *Sainte-Tulle* ; partopreno de EKEM

> junio 26 - *Gap* (05) : « *Fête de la Paix* »

> julio 1/3 – *Manosque* : partopreno de EKEM en festivalo « *A propos du Japon* »

> aŭgusto kaj septembro – *Sanctuaire Notre-Dame de la Salette* (05) : prezentado de Esperanto al trideko da junuloj far *Monika Arnaud*

> septembro 10/11 - *Embrun* (05) : « *Foire Bio Génépi* »

> septembro 21/25 - *Manosque* (04) : « *Correspondances de Manosque* » ; partopreno de EKEM

> septembro 27 - *Aix-en-Provence* (13) : « *Journée Européenne des Langues* » ; partopreno de federacianoj

> novembro 17/28 - *Manosque* (04) : « *Semaine de la Solidarité* » ; partopreno de EKEM

**9 –diversaĵoj**

> artikolo de *Marc Gallardo*, en la februara «Kontakto» (pri *Svetlana Aleksejevîĉ*, Nobel-premiito)

> artikolo de *Renée Triolle* en la februara «Monato», (intervjuo de la verkisto *Andrej Kurkov*)

> tekstoj de *Renée Triolle, Marcel Bourrelly* kaj *Sylvaine Lemagadure* en omaĝa libro pri Tolstoj

> kontribuaĵo de *Nina Korĵenevskaja* en ruslingva eldono de « *Le mot et l'idée* »

> denova partopreno de *Anita Collomb* kaj *Pascal Vilain* en la poezia konkurso : « Poezio el ĉiuj ĉieloj ». Poemo de *Pascal* aperis en la tria antologio de la konkurso.

> partopreno de *Nicole Lafitte* kaj *Pierre Oliva* en la ĝenerala kunveno de « *Espéranto-Info* », en julio.

**10 – venontaj okazaĵoj** > novembro 2017 - *Le Beausset* (83) : datoj, kursoj kaj distra programo decidotaj

## 3 - Financa raporto (*Nicole Lafitte*)

**bilan financier année 2016**

| recettes | | dépenses | |
|---|---|---|---|
| cotisations | 366,00 | édition et envoi gazette | 420,00 |
| dons | 22,00 | exposition Briançon/Vilain | 19,00 |
| congrès de Marseille | 1033,00 | achat verres (Espéranto-France) | 25,00 |
| stage Le Beausset (bénéfice : 209 €) | 1448,00 | stage Le Beausset | 1239,00 |
| | | déplacements comité.dir. (M. Cerisay) | 159,00 |
| | | déplacements comité.dir. + UFE (P. Vilain) | 132,00 |
| | | photocopies, timbres | 19,00 |
| | | frais banque | 1,00 |
| | | tournée S-ro Kurz (UEA) | 79,00 |
| | | filmo (C. Beaumont, F. Salzard, JC. Roger) | 150,00 |
| | | **excédent au 31/12/2016** | **626,00** |
| | | | |
| **total** | **2869,00** | **total** | **2869,00** |

## Kultura Semajnfino

Kiel kutime novembrofine, staĝo estis proponita en *Le Beausset*, organizita de *Pierre Oliva* kaj *Nicole Lafitte*, sub la aŭspicioj de la federacio *Espéranto-Provence*.

Unu el la partoprenintoj, *Roselyne Favier*, bonvolis skribi prian raporteton :

Mi ŝatas tiujn momentojn, kiam mi partoprenas en esperanta kunveno, ĉar tio estas por mi okazo iomete paroli la internacian lingvon kaj multe aŭdi... kiam mi povas, ĉar ofte estas brukonfuzo pro la multnombraj parolantoj.
En *Le Beausset*, estis agrablaj momentoj kun bona etoso ĉirkaŭ la manĝajoj ame preparitaj de *Pierre*, helpata de *Nicole*.
La domo, kie ni loĝis, estas tre malnova, sed ĝi estas tre bone prizorgata, kaj tie mi sentis min bone.
Vespere mi ŝatis la filmetojn - interalie tiun, kiu montris al ni la kuraĝan *Alain* kaj lian perbiciklan vojaĝon - la ridigajn teatraĵojn kaj aliajn spektitaĵojn.
Kaj la kurso ! La ĉefa afero por mi !
Tiu, kiun mi sekvis, gvidita de *Renée*, certigis min pri la neceso lerni plu kaj plu... sed rapide, ĉar la tempo forflugas...
Mi koleras kontraŭ mi mem kaj la vivo, ĉar mi probable devus esti Esperanto-instruistino, se mi ne forlasus la studon dum tro da tempo (30 jaroj !)
Antaŭ la disiĝo, tio ja estas kutimo, ni ĉiuj ridetis por komuna foto.
Sed kial *Renée* volis kaŝi sin ? Neniu kredas, ke ŝi ne estis tie !
Dankon al ŝi kaj al ĉiuj !



# El la regionaj asocioj

----------

## 04 - EKEM - Esperanta Kulturo en Manosque

L'assemblée générale d'EKEM se tiendra le samedi 21 janvier à la Maison des Associations de Manosque à partir de 14 h. Elle sera suivie du traditionnel pot de l'amitié.

**Kiel kutime, EKEM ricevis novan alvokon por la Internacia Virina Tago (8-a de marto).**

La ĉefa temo de la Internacia Virina Tago 1917 en Hiroŝimo estas : "Mi vivas en Hiroŝimo, en Japanio, en la mondo." En la kunveno de la Tago, ni spektos la filmon "Urbo de vespera kalmo, lando de ĉerizfloro." Kaj kiel urbanoj de atombombita Hiroŝimo, ni pripensos elektadon kaj agadon al konstruo de vere paca mondo, por ke ne plu ripetiĝu milita hororo en la mondo.
Ĉiu, en sia ĉiutaga vivo, en sia loko, pripensu kaj komuniku pri paco.
Bonvolu sendi al ni vian mesaĝon por 2017 :
1) Kio estas grava por paco laŭ via opinio ? (en 5 linioj)
2) Se vi sendos vian portreton, ni prezentos ĝin kun via mesaĝo, kiun ni ekspozicios ĉe la Virina Centro de Hiroŝimo.
Kun antaŭdankoj,
OSIOKA Taeko

Limdato : 15-a de februaro, ĉar ni ekspozicios la mesaĝojn ekde la 25-a.
Bonvolu aldoni la jenajn informojn : nomo, sekso, aĝo se eble, profesio, loĝloko (urbonomo), lando.
kontaktadreso:
OSIOKA Taeko - Oogonzantyo 7-15, Minami-ku, Hirosima, 734-0041 Japanio
osioka@mua.biglobe.ne.jp




## 13 - Centre Culturel Espéranto-Marseille

Le mardi 10 janvier a eu lieu au CIRA la remise aux lauréats des diplômes de l'Institut Français d'Espéranto, suivie d'une soirée amicale autour du gâteau des rois et de boissons.

## 83 - Esperanto-Klubo Fréjus - Saint-Raphaël


SAINT-RAPHAËL — Mardi 20 décembre 2016

**Les espérantistes fêtent la naissance de leur initiateur**

Les espérantistes réunis, rue Zamenhof, pour honorer le créateur de l'espéranto. (DR)

Comme tous les ans, les membres du club d'espéranto de Fréjus - Saint-Raphaël, rejoints par quelques amis de la région PACA, se sont retrouvés pour fêter à la fois la fin de l'année, la naissance de l'initiateur de l'espéranto, le docteur Zamenhof, né le 15 décembre 1859, et la culture espérantiste, en particulier sa littérature très riche, qu'elle soit originale ou traduite.

**Pourquoi apprendre l'espéranto ?**

Langue équitable, elle permet de communiquer sur un pied d'égalité, sans discrimination. Langue qui s'apprend vite, elle met en confiance et donne l'envie d'apprendre d'autres dialectes. Mais elle préserve également la diversité linguistique et donne accès à toutes les cultures.

**Où apprendre ?**

Pour ceux qui préfèrent apprendre seul et à leur rythme, par Internet ou sur téléphone portable, de nombreux sites et applications offrent des cours gratuits. Il est aussi possible de suivre les cours donnés par le club local, chaque mercredi, de 15 h à 17 h, à la maison des associations, rue de la Soleillette, à Saint-Raphaël.

Renseignements [illegible]

Var Matin -

*Eroj el la parolado de Pascal Vilain*
*ĉe "Rue Zamenhof"*

Ĉijare, nia ĉeesto ĉi tie - je la stratplato, kiu havas la nomon de la iniciatinto de nia lingvo - estas stampita de tri datrevenoj. [...]
La duan el la tri datrevenoj, ĉiuj el vi sendube konas : la 15-an de decembro, kiu estas tiu de la naskiĝdato de Zamenhof en 1859.
Sed eble vi ne scias pri la tria : la 14-a de aprilo 1917, dato de lia forpaso. Li tiam aĝis kvindek-sep jarojn.
Okazos verŝajne en la tuta Esperantio multe da omaĝeventoj, en la unuaj monatoj de la venonta jaro, kiuj rememorigos pri la mirinda personeco de tiu homo, kies nomo estas ĉiutage legebla je tiu ĉi strato de *Saint-Raphaël*, cent jarojn post lia forpaso kaj 129 jarojn post la unuaj paŝoj de nia lingvo.

Ĉar la 15-a de decembro estas por la Esperanto-movado ankaŭ la tago de la Esperantaj libroj, mi ŝatus fari al vi proponon : kial ne aĉeti, aŭ se ne pruntepreni, kaj almenaŭ legi… biografion, kiu ebligos al vi pli bone konatiĝi kun la eksterordinara vivo de Ludoviko Lazaro Zamenhof ?
Jen kelkaj el ili :

Du malnovaj : « Vivo de Zamenhof », de *Edmond Privat*, kaj « Zamenhof » de *Marjorie Boulton*.
Kaj du pli freŝdataj : « La Zamenhof-strato » de *Roman Dobrzynski*, kiun vi povas legi ankaŭ en la franca : « *La rue Zamenhof* », kaj « La Homo, kiu defiis Babelon », de *René Centassi* kaj *Henri Masson*, kiu same ekzistas en la franca : « *L'homme qui a défié Babel* ». [...]

## ZEO-oj en *PACA > 4 - Callian* (83)


Ĉu estas ZEO-o en *Callian* ? Ne vere.
En tiu-ĉi vilaĝo de la departemento Var, nenie legeblas la vortoj "Esperanto", aŭ "Zamenhof", nenie troveblas klare indikitaj spuroj pri nia lingvo.
Kial do tamen paroli pri ĝi ? Ĉar unu el ĝiaj ĉefaj placoj nomiĝas *"Place Honoré Bourguignon"*, kaj eble tiu-ĉi nomo estas konata de kelkaj el vi.
Kiu estis *Honoré Bourguignon* ? Jen eroj el lia biografio, legeblaj ĉe Vikipedio :

*"Honoré Bourguignon* (1899-1944), estis franca instruisto kaj esperantisto, aktiva en la laborista movado.
Li naskiĝis la 15-an de decembro *(samtage kiel Zamenhof !)* 1899 en Tulono. Li elektis la instruistan karieron kaj instruis sinsekve en *Signes, Saint-Maximin, Besse-sur-Issole, Callian*. Ĉiuj tiuj vilaĝoj troviĝas en la Vara departemento. Li estis tre frua adepto de la metodoj provitaj kaj propa-ganditaj de *Célestin Freinet* al kiu lin ligis profunda amikeco.
Li esperantiĝis en 1931, preskaŭ tuj alprenis respondecojn inter la esperantistaj instruistoj, kaj organizis plurajn esperantistajn somerlernejojn en Francio.









*Dankegon al Graziella Tallent, «Assistante de conservation, Responsable de la médiathèque de Callian», kiu disponigis al mi la portretan foton de Honoré Bourguignon.*

Li ludis grandegan rolon en la reaktivigo de IAREV (Internacia Asocio de Revoluciemaj Esperanto-Verkistoj) en 1934, interalie per eldonado de ties gazetoj.
Li partoprenis en la Rezisto-movado kontraŭ la nazioj dum la Dua mondmilito. Arestita fine de la milito, li estis sendita al la koncentrejo de *Dachau*, kie li mortis la 23-an de decembro 1944."
Lia filo, *Lucien Bourguignon*, kiu loĝas en *Aix-en-Provence*, verkis pri sia patro historian eseon :
« *Honoré Bourguignon*, IAREV-ano ».
En alia numero de nia gazeto, mi verŝajne skribos pli longe pri tiu temo, sed intertempe vi jam povas legi la eseon ĉi tie :
http://satesperanto.org/-HONORE-BOURGUIGNON-IAREVANO-Libro-.html

*Pascal V.*

## Diversaĵoj

### La Mesio de *Händel* en Esperanto
### unika evento en la kultur-historio de Esperanto

La oratorio de *Friedrich Händel* estis prezentita en Esperanto la 29-an de marto 1987 fare de la fama 100-membra neesperantista koruso de Centra Ensemblo de *Kisz*. La muzika sonkasedo, eldonita de «Lingvo - Studio», jam de multaj jaroj ne plu estas aĉetebla.
Ĉijare la eldonejo decidis liberigi la sondosierojn en la originala kvalito por libera uzo - do ili estas nun je via ĝuo kiel senpaga donaco de la eldonejo. Aŭskultu la koncerton ĉe : http://www.eventoj.hu/mesio/

**«Nul en langues ? Plus jamais !» de Greta Franclet**
nouvelle édition 2016 . Éd. Carrefour du Net , 51 rue des Aulnoyes, 02310 Domptin, tel. 03 23 69 11 28
prix : 28,60 € (port compris)
p. 23 : référence à Claude Piron et à son livre «Le défi des langues» ; p. 165 : illustration avec le mot espéranto ; p. 214 : «Pourquoi apprendre l'espéranto ?»
*inf. José Grammatico*

## Paĝo de la komencantoj *(ĉu nur... ?)*

### teksto en facila esperanto

Nova direktoro de fabriko estis tre malmulte ŝatata[1] kaj pri tio li estis treege malkontenta.

Iun tagon li havis okazon paroli kun la plej[2] maljuna oficisto de la entrepreno kaj klopodis[3] iom bonigi sian[4] reputacion.

"Eble vi ne volas kredi tion, Jones, li diris, sed kiam mi forlasis mian antaŭan oficon, la laboristoj donacis al mi arĝentan cigaredujon."

"Ĝuste, diris Jones, ni donacos al vi oran, se vi ree foriros."

### klarigoj / atentigoj

**1 : "ŝati" kaj "ami"**

- s'il s'agit de "quelqu'un", "ŝati" signifie "avoir une opinion favorable", "apprécier", alors que "ami" fait plus appel au coeur - "ŝati sian najbaron", "ami sian infanon"

> s'il s'agit de "quelque chose", "ŝati" signifie aussi "apprécier", et dans ce cas, il est possible d'utiliser également "ami" - "ŝati la kafon", "ami sian laboron"

**2 : la plej / la pli**

> on utilise "la plej" quand il y a comparaison entre plus de deux personnes ou choses

**(la plej** maljuna **el ĉiuj** oficistoj de la entrepreno)

> on utilise "la pli" s'il y a comparaison entre 2 personnes ou choses

**(la pli** juna **el ambaŭ** infanoj)

**3 : klopodi**

se mettre en peine de..., faire des démarches pour...

**4 : lia-ŝia-ĝia-ilia / sia**

la reputacio de la direktoro : **lia** reputacio *(de li)*

la reputacio de la direktorino : **ŝia** reputacio *(de ŝi)*

la reputacio de la gedirektoroj : **ilia** reputacio *(de ili)*

mais : la direktoro bonigis **sian** reputacion

> "sia" se rapporte au sujet (direktoro) de la dernière action exprimée (bonigis)



### Plurelekta demandaro

*laŭ verkoj de Robert Llorens*

*eldonitaj de Espéranto-Info*

**1 - gramatika**

a) Mi venos .......... la vetero estos bela.

1 - kiam ; 2 - kiom ; 3 - kiel

b) Vi estas tiel bela .......... ŝi.

1 - kiam ; 2 - kiom ; 3 - kiel

c) Li estas la plej granda .......... siaj kamaradoj.

1 - en ; 2 - el ; 3 - de

**2 - vorto-trezora**

ĉ) elektu "alianci", "alojigi" aŭ "interligi" por traduki la francan "allier"

1 - unir : .............................

2 - des métaux : .........................

3 - liguer : ...........................

d) elektu "eklumigi", "ekbruligi" aŭ "ŝalti" por traduki la francan "allumer"

1 - le feu : .............................

2 - une bougie : ..........................

3 - une ampoule électrique : ...........................



### Superzam'

*proponita de*

*Jean-François Cousineau*

*1. Kiu estis la originala nomo de Esperanto ?*

a- Lingvo Internacia b- Lingvo Universala

c- Transnacia Lingvo

*2. En kiu lingvo originale aperis la Unua Libro de Esperanto ?*

a- rusa b- germana c- pola

*3. Kiu frisa muzikbando furoris en Esperantio ĝis la jaro 2010 ?*

a- Kato b- Kajto c- Kaĉo

*4. Kiomaĝa estis Zamenhof kiam li forpasis ?*

a- 37 b- 47 c- 57

*5. Kiu korelativa finaĵo signas posedon ?*

a- es b- a c- el

*6. Kiu estas la plej longa Azia rivero ?*

a- Amuro b- Mekongo c- Jangzio

**Solvoj de la demandoj en EP 106 - aŭtuno 2016**

**Plurelekta demandaro**

**1 - gramatika**

a : 1 ; b : 3 ; c : 2

**2 - vorto-trezora**

ĉ1 : areo ; ĉ2 : nesto ; ĉ3 : draŝejo

d1 : veturi ; d2 : viziti ; d3 : taŭgi

**Superzam'**

1 b > Bulonjo-ĉe-Maro ;

2 b > Songô sub pomarbo ;

3 b > Marita ;

4 a > 1887 ; 5 b > e

6 a > Kongo (4700 km)



## El la mesaĝkesto de la legantaro

***Pierre Oliva***
Pli kaj pli bela estas nia gazeto. Gratulon. Ĉu povos okazi foje, ke vi ne plibonigos ĝin ?
*respondo de la red.*
*Mi esperas, ke ne, Pierre. Igi sian revuon ĉiam pli bela kaj interesa devus esti la celo de ĉiu redaktoro, ĉu ne ?*

***Philippe Combot***
paĝo 2 : « Dante Allighieri » devus esti « Dante Alighieri ».
Mi rimarkis aliajn eraretojn, sed tro etajn por esti menciindaj (spacetoj...).
*respondo de la red.*
*Prave, Philippe. Tio instigos min estonte ne kopii ricev-itan mesaĝon sen atenta kontrolo.*

***Monika Arnaud***
Dankon kaj gratulojn, bele prezentita gazeto, bunta kaj alloga.
*respondo de la red.*
*Dankon, Monika ; bedaŭrinde, ricevantoj de la nura papera versio ne scias, ke la gazeto estas bunta !*

***Jacques Ribon***
Dankon.
*respondo de la red.*
*Estas plaĉe por redaktoro scii, ke la gazeto bonorde atingis federacianon !*

***Favier Roselyne***
Dankon pro la sendo de la gazeto. Ĉiam interesa ĝi estas. Tamen mi ankoraŭ ne povas bone respondi al la demandoj por komencantoj. Por iomete progresi, mi partoprenos en la staĝo dum la semajnfino en Le Beausset.
*respondo de la red.*
*Tio estas ja la celo de staĝoj kiel tiu en Le Beausset (kaj ankaŭ de la taskoj de la paĝo por komencantoj) : plibonigi la nivelon de ĉiuj, kiuj deziras progresi en la lingvo-uzado.*






## À noter sur votre agenda

**dans notre fédération**

**1er jeudi de chaque mois** : Café linguistique à l'Equitable Café, 54 Cours Julien, 13006 Marseille
**mars 4-11** - Les Issambres (83) : Mediteranea Esper-anto-Semajno

**en France**

**avril 10-14** - Bouresse (86) - Kvinpetalo : "Pedagogia staĝo" avec Katalin Kovats
informoj@kvinpetalo.org
**avril 14-22** - Baugé (49) - Grésillon : 7ème Rencontre PRINTEMPaS - cours intensifs et session d'examens internationaux CECR d'espéranto
kastelo@gresillon.org
**avril 15-18** - Saint-Sébastien-sur-Loire (44) : 69ème Congrès de SAT-Amikaro
http://www.sat-amikaro.org/
**mai 16-23** - Colmar (68) : 69ème congrès de la fédé-ration internationale espéranto des cheminots (IFEF)
http://ifef.free.fr
**mai 25-28** - Mandres-les-Roses (94) : Congrès d'Espé-ranto-France
http://esperanto.paris/congres-esperanto-france-2017

**en Europe**

**mars 14** - Herzberg-am-Harz (Allemagne) : journée commémorative pour le centenaire du décès de Zamenhof ; exposition au musée, rencontres...
esperanto-zentrum@hotmail.com
**avril 10-17** - Essen (Allemagne) : "PSI - Printempa Semajno Internacia"
rencontre familiale avec excursions, conférences, cours pour tous âges
petra.dueckershoff@esperanto.de
**avril 12-18** - Bergame (Italie) : 41ème Festival International des Jeunes sur le thème de la paix et du centenaire du décès de Zamenhof
iej@esperanto.it

**ailleurs dans le monde**

**juillet 22-29** - Séoul (Corée du Sud) : 102ème Congrès mondial d'espéranto (UK-2017)
http://www.uea.org/kongresoj/
**juillet 29 / août 5** - Séoul (Corée du Sud) : 90ème Congrès de SAT
http://sat90.org/